



EKO 2015-39 sendita al Budapeŝto, la 12an de aŭgusto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

AMO-Seminario 15 en Greziljono fine de oktobro 2015

La Kulturcentro Greziljono gastigos la unuan AMO-seminaron en Francio, kadre de sia aŭtuna programo, kiu koincidas kun la tiusezona lerneja paŭzo en Francio. La seminario okazos inter dimanĉo la 25a kaj sabato la 31a de oktobro, 2015.

Temo: Grimpri la monton granitan

La celo estas rigardi la tutan procedon por atingi sukceson. Tio implicas kuntiri elementojn kaj rezultojn el multaj ĝisnunaj seminarioj. Tio precize spegulas la temaron de la unua seminario de TEJO, okazigita en 1980 en la Eŭropa Junulara Centro en Strasburgo.

La seminario disvolviĝos laŭ la kursa modelo de Greziljono: trihora matena sesio kun plia horo antaŭ la vespermanĝo, tiel ke la plimulto de la posttagmezoj restas liberaj.

Laŭteme okazos kvar sesioj; kiujn ni nomu etapoj laŭ la montgrimpa metaforo:

Etapo 1. Kiel krei intereson

Etapo 2. Kiel anonci kurson

Etapo 3. Kiel instrui la lingvon

Etapo 4. Kiel gvidi al aktiva uzado



1. Kiel krei intereson

Strategioj por varbado (AMO 1, 2, 5, 9 kaj 11), retaj ebloj (AMO 6, 7 kaj 8), uzado de fotoj kaj filmfarado (AMO 5, 12 kaj 14), vasta kaj ripeta vidigo de Esperanto, kunlaboro kun 'similideanoj' (AMO 9), ligiĝo kun pli vastaj celoj (AMO 3), kiel prezenti la lingvon vivanta, vivrajta kaj reale uzata.

2. Kiel anonci kurson

Kiel rilati kun ĵurnalistoj (AMO 1 kaj 5), kiel koncepti afiŝojn, mastrumi anonctabulojn kaj stratbudojn, prizorgi retejojn. Argumentoj por konvinki pri la allogo aŭ utilo de kurso (AMO 11).

3. Kiel instrui la lingvon

Kapti la esencon de la lingvo (AMO 4); la graveco de cellingva praktikado, alpreno de teknikoj el la nuntempa lingvo-instruado. Kion pretendi pri la lern-facileco de la lingvo kaj kiel prezenti ĝiajn lern-faciligajn kvalitojn. Kiel trejni instruistojn kaj okazigi kursojn; aliflanke, kiel atingi memlernintojn de retaj kursoj (nova temo).

4. Kiel gvidi al aktiva uzado

Grupdinamiko (AMO 3, 10), filmkreado (AMO 12), daŭripova evoluigo (AMO 9), landa agado (AMO 2, 13), resumo de fakaj agadoj kaj instigaj projektoj tra nia komunumo (AMO 6).

Kiel kutime, ĉiu sesio enhavos praktikajn ekzercojn plenumotajn etgrupe aŭ pare. Estos ebloj por seminarianoj prezenti siajn proprajn spertojn aŭ ideojn. La seminarion gvidos Stefan MacGill, kiu mem ĉeestis plurajn eŭropajn seminariojn kaj zorge protokolis ilin.

Ni antaŭvidas, ke en dimanĉo la 25a de oktobro okazos enkonduko kun orientiĝo kaj konatiĝo per intervjuado. Sekvos la kvar temtagoj plus plia sesio kun rolludo pri tiu tute nove kreita kaj intense amata kvinlanda kontinento Azanio, kiu urĝe bezonas starigon de Kontinenta Komisiono. Jen la tasko por la ludantoj, kiuj povos esti seminarianoj kune kun aliaj ĉeestantoj. En la sabata mateno (la 31an de oktobro) okazos ferma sesio kun pritakso kaj kreo de rekomendoj.



La seminario okazos kiel unu kurso ene de la aŭtuna staĝo de la Kulturcentro. Sekve kondiĉo por partopreno de la seminario estas aliĝo al tiu staĝo (24 okt – 3 nov), plus pago de la kutima kursa kotizo de €10. UEA ne ofertas stipendiojn por ĉi tiu seminario.

Kaptu la okazon! Serioze pripensu aliĝon. Seminaria aliĝado estas farebla pere de la retejo de Greziljono, kadre de aliĝo al la aŭtuna staĝo, laŭ kondiĉoj kutimaj por tiu kulturcentro. Iru por informoj kaj aliĝo al <http://gresillon.org/spip.php?rubrique36>.

Simila teksto troveblas delonge en la retejo de la Kulturcentro.

AMO 16 en Havano – novaj ebloj

Tiu seminario atestas pri la praktikaj efikoj de la malrapida malfrostigo de rilatoj inter Kubo kaj Usono. Aldone al la anoncitaj kubaj gvidantoj, aktive rolos d-ro Duncan Charters el Usono.

AMO en 2016

Rezulte de kontaktoj en UK kaj aliloke, ni havas jam **dek du** kandidatojn por AMO-seminarioj en 2016.

Vortoj 640

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiče 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

PDF farita de Nuance Power PDF